BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL
Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul


CGC Nº
00406 504/1000-06

REDAÇÃO E PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 226-1298
70.000 – Brasília (DF)

**JUNHO DE 1981** | **ÓRGÃO OFICIAL DO BKE** | **BOLETIM Nº 62**

**REDAÇÃO: MARIA ALMADA**




## 66-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN BRAZILIO

**DE LA 25-A DE AŬGUSTO ĜIS LA 1-A DE SEPTEMBRO, 1981.**

D-ro L. L. Zamenhof, kreinto de la
Lingvo Internacia Esperanto (1859-1917)

## DIREKTORARO DE B.K.E.



F.S. Almada
Prezidanto



Elvira Fontes
Vicprezidanto



Carlos S. Cunha - Kasisto
Nelson P. Souza - Sekretario

## LA 66-A UNIVERSALA KONGRESO

La solena inaŭguro de la 66-a UK okazos la 26-an de julio, de la 10-a ĝis la 12-a horo, en la Nacia Parlamentejo, laŭ la Rezolucio Nº 231, de 1981 - (Deputitaro).

Ĉe la fino de la monato julio la pensoj de la tuta esperantistaro fiksiĝos je nia lando. Esperantistoj el ĉiuj partoj de la Terglobo ekveturos al nova "Esperantujo" - Brazilio en Brazilo. Centoj da vizitontoj svarmos en la "ĉefurbo de la futuro", parolante la lingvon de la futuro - Esperanto. Grandega propagando por nia movado, en eksterlando kaj enlando. Ĉie la oficialaj organoj estos informataj pri la ekzisto de la internacia lingvo. La Universala Esperanto-Movado vekos la atenton de la tuta Ameriko.

La latinamerikanoj malmultnombre aperados ĉe la UK-oj, sed abunde korespondadas kun la tuta mondo kaj nun ĉiuj havos okazon konatiĝi persone kun la korespondantoj kaj akiri novajn geamikojn. La emocio estos granda.

La brazilanoj aliĝis amase; ĝis nun pli ol 600 personoj, nombro, kiu estas rekorda en la historio de Esperanto-Movado. Ĉio signifas, ke nia UK estas eksterordinara okazintaĵo kaj certe neforgesebla.

Estas antaŭvidite en la programo aranĝoj por ekzercadi la lingvon dum la UK. La grupon gvidos spertaj parolantoj, kio sendube helpos en la praktikado de la lingvo. Okazos ankaŭ pluraj parolrondoj, ekspozicioj, ekskursoj, renkontiĝoj pri seriozaj laboroj kaj amuziĝo. Ĉiuj laŭvole povos partopreni la laborojn.

La libroservo estos riĉa kaj ni proponas al ĉiuj viziti ĝin. Pli ol 2400 libroj estos je dispono de ĉiuj kongresanoj, ĉiuj interesatoj povos aĉeti laŭdezire bonegajn verkojn. UEA jam ekspedis ilin al Brazilo. Ek al Brazilio!

## II-A KONGRESO DE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

La evento okazos de la 31-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro, 1981, en la urbo San-Paŭlo.

Ĝia ĉeftemo estas: Reorganizo de la statuto de BKE kaj elekto de nova direktoraro. La organiza komitato:

Prezidanto: - S-ro Oswaldo Leite de Moraes.

Sekretario: - F-ino Francisca Martos.

Kunlaborantoj: - Gejunuloj Amelia Maiumi Hamad, Marcelo U. Ferreira kaj José Luiz Ferreira.

Kasisto: - S-ino Marija Pozder Almada - adr.: - CEP 11.100 - Santos (SP) - R. Galeão Carvalhal, 31 apto. 73.

Kontrolistoj: - S-anoj Walter Francini kaj Deodato F. Mello.

La kongreskotizo estos Cr$ 300,00 ĝis la fino de aŭgusto kaj post tiu dato Cr$ 500,00. La aliĝkotizojn volu sendi al la supra adreso de la kasistino. Anticipe dankon!

Unu el la prelegantoj pri la instruado de Esperanto estos nia vicprezidanto Euclydes Geraldis Carvalho, el Bauru.

## LA ESPERANTO-MOVADO EN BRAZILO

Ĉe la fino de la pasinta jarcento enmigris Brazilon s-ro Francisco Waldomiro Lorenz, el ĉekoslovakio, alportinte la semon de la Zamenhofa idealo al la "Nova Mondo" - Latinameriko.

Ek de tiam Esperanto travivis plurajn fazojn. En 1906 estis fondita en la urbo Campinas, ŝtato San-Paŭlo, la unua grupo de esperantistoj, kaj tiu societo eldonis la unuan gazeton en la internacia lingvo sub la titolo "La Suda Stelaro". Poste estis fondita la Brazila Esperanto-Ligo, en kiu laboradis multaj kompetentaj idealistoj, inter kiuj troviĝis S-ro Porto Carreiro Neto, Ismael Gomes Braga, Caetano Coutinho, Carlos Domingues, kaj aliaj. BEL okazigis siajn jarajn kongresojn.

En 1950 estis fondita la kultura Kooperativo de Esperantistoj sub la gvido D-ro Braz Cosenza, kiu estas unu el la reprezentantoj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Brazilo. Ĝi kutimas okazigi jaraj kunvenojn (Seminariojn). La movado iom post iom lantiĝis kaj fine tute stagnis.

En la jaro 1974-a grupo da progrese-

muloj decidis revigligi la movadon kaj fondis la Brazilan Konsilantaron de Esperanto kun sidejo en la nova ĉefurbo de Brazilo. Ĝi eldonas monatan informbultenon regule, okazigis la 1-an Latinamerikan kongreson en Marilia (SP) en la jaro 1978-a subvenciita de la Ministerio por Edukado, la unuan fojon en la historio de nia movado. Helpe de la progresemaj gesamideanoj aĉetis propran sidejon en la ĉefurbo, kiu estas inaŭgurota dum la 66-a UK. Okazigis sian I-an Kongreson en la jaro 1980-a, en Juiz de Fora (MG) kaj intencas okazigi la 2-an en San-Paŭlo (SP). Ĝi rekrutis elstarajn kunlaborantojn tra la tuta Brazilo kaj vigligis la movadon tiel ke dank al multaj bonaj esperantistoj okazas en nia lando, la unuan fojon en la Suda Hemisferio la 66-a UK.

En 1968, laŭ la Leĝo 24 de la 16-a de marto de la sama jaro de la Federacia Konsilio pri Edukado, estas permesate instrui Esperanton en kolegioj kaj fakultatoj, flanke de la angla, franca, germana kaj aliaj fremdlingvoj.

La lingvo estas instruata en la jenaj urboj de la Federacio: Fortaleza (CE), Maceió (AL), Natal (RN), Salvador (BA), Ilheus (BA), Juiz de Fora (MG), Bauru (SP), Campinas (SP), Volta Redonda (RJ), Curitiba (PR), Porto Alegre (RS), Pelotas (RS), Rio Grande (RS) kaj aliaj.

En diversaj societoj ekzistas pluraj kursoj. Ĉiuj amplekse propagandas en gazetoj, radio kaj TV, efike, danke al la okazonta UK.

En spiritismaj medioj estas granda la intereso pri la internacia lingvo kaj ĝi estas instruata en sennombraj organizaĵoj.

Sur propaganda kampo sendube elstariĝas s-ano Majoro Gilberto A. Silva Velho, el Caçapava (SP). Sentime ni asertas, ke li okupas la unuan lokon el tuta Brazilo pri tiu afero.

S-ano Silva Velho kunlaboras kun grandnombraj gazetoj kaj periodaĵoj. Kontaktas multajn aŭtoritatulojn, verkas artikolojn, kaj havas la plej bone organizitan ekspozician materialon. Li subtenas nian movadon morale kaj materie, sindediĉante al la Zamenhofa idealo kun grandа fideleco. Li estas unu el niaj ekstaraj kaj laŭdindaj, imitindaj s-anoj.

**GOJANIO (GO)**

La nova direktoraro de Instituo Gojano de Esperanto, kiu havas sidejon en la Banco Mercantil do Brasil - I-a etaĝo - S/104, CEP 74.000 - Av. Goiás, 636 - Centro - Gojanio (GO); Prezidanto: - Frederico Pinto Cedro; Vicprezidanto: - Marlene Alves Gomes; 1-a Sekretario: - José Frauzino; 2-a Sekretario: - Helio José Pires; Kasisto: - Margareth Alves Gomes; 2-a Kasisto: - Hilda Cedro Gomes; Administra Direktoro: - Francisco de Moraes Sobrinho; Direktoro pri Instruado: - Hebe Gonçalves; Direktoro pri Informado kaj Propagando: - Fabricio Rodrigues Valle; Sporta Direktoro: - Silvio Pereira Franco; Bibliotekisto: - Maria Cristina Costa. Kontrola Konsilantaro: - Dro Raul Conde, Sebastião Antonio Queiroga kaj Antonio Lisbôa. Tiu direktoraro enposteniĝis en la 25-a de aprilo, 1981 kaj havas mandaton ĝis la 25-a de aprilo 1982.

**FLORIANOPOLIS (SC)**

En tiu ĉi urbo estis kreita la Esperantista Societo de Santa Catarina, kiu jam funkcias en sia sidejo, sur la Placo 15 de Novembro, 21,4-a etaĝo, ĉambro no 402 - CEP 88.000 - Florianópolis. La estraro: Prezidanto: - Walter Bopré; Vicprezidanto: - Sérgio Bopré; Sekretario: Mário Cesar Goulart; Kasisto: - Afranio T. Bopré; Bibliotekisto: - La Kasisto. Ni gratulas la estraron, esperante, ke la nova organizaĵo havu sukceson kaj prosperu. - Nova kurso jam estas gvidata.

**RIO DE JANEIRO (RJ)**

Laŭ informo de nia s-ano Chersoneso Galvão estis elektita la jena estraro por la Esperantista Societo de Rio de Janeiro: Li estas la Prezidanto; ĝenerala Sekretario - Gloria Bello; 1-a Sekretario: - Elma do Nascimento; Kasisto: - Américo Amaro Pina; Bibliotekisto: - Black Ghidalevich; Kontrola Konsilantaro: - Efektivaj membroj: - Yolanda Evangelista Silveira, Bento Pires da Rocha kaj Delio Pereira de

Souza. Anstataŭantoj: - Humberto Leite de Araujo, Robinson Mattos kaj Nelson Pereira de Souza.

La mandato etas por unu jaro, ĝis aprilo de 1982.

BONA ESPERO

La 9an de majo 1981 okazis en Alto Paraiso (Go), la ordinara jara asembleo de Fazenda Escola Bona Espero. La ĉeestantoj konstatis kun gratulo la normalan funkciadon de la institucio, kiu morale kaj materiale fartas bone, danke al persista laboro kaj helpo de pluraj sindonaj esperantistoj el diversaj landoj. En la socia kampo, la institucio asistas nuntempe multenombrajn familiojn kaj funkciigas elementan lernejon kun 28 gelernantoj, el kiuj plimulto vivas konstante en Bona Espero. Dum la lastaj monatoj, komisiono de IBDF, konstatinte la ne malhaveblan rolon de Bona Espero por la evoluo de la regiono, definitive eltiris ĝian teritorion el la limoj de la starigota Nacia Parko de "Chapada dos Veadeiros". Katolika organizaĵo "MISEREOR", laŭ peto de grupo de "Amikoj de Bona Espero", oficiale starigita en Germanujo, decidis subvencii la institucion por la akiro de nova mikrotraktoro. La asembleo aprobinte la spezkonton por la jaro 1980, decidis kunvoki eksterordinaran asembleon en difinota dato je la fino de septembro '81, por la elekto de nova estraro por la periodo 1982-84.

La estraro: Enivaldo Alves Silva - Arthur Vellozo - Neuza Araujo - Giuseppe Grattapaglia - Ursula Grattaplagia.

## BALANCETE DE RECEITA E DESPESAS REFERENTES AO EXERCÍCIO DE 1980 – SPEZKONTO DE LA JARO 1980 –

RECEITA – ENSPEZOJ

| | | |
|---|---|---|
| Caixa 1º/01/80 - en kaso je la 1/01/80 | Cr$ | 10.878,00 |
| Verbas Federais - Frderacia subvencio deputitoj | | 7.000,00 |
| Verbas Estaduais - (Secretaria de Educação e Cultura - GO) | | 40.000,00 |
| Ŝtata Subencio - (Eduka Sekretariejo de Gojanio) | | |
| Produtos da Fazenda - (Vendidos - Venditaj | | 85.920,00 |
| Produktoj de la bieno (Consumidos - Konsumitaj | | 120.000,00 |
| ( - de esperantistoj | | 163.822,00 |
| Doações - Donacoj ( - de ne-esperantistoj | | 19.500,00 |
| ( - provizoj "Merenda Escolar" | | 30.207,00 |
| Total Entute | | 477.327,00 |

DESPESAS – ELSPEZOJ

| | | |
|---|---|---|
| (Comprados-aĉetitaj | Cr$ | 80.569,00 |
| Gêneros alimentícios - Vivtenado (Produzidos-produktitaj | | 120.000,00 |
| ("Merenda Escolar" | | 30.207,00 |
| (Gazolina e ônibus-Benzino kaj aŭtobusoj | | 45.905,00 |
| Transportes (Pacotes rouparias - pakaĵoj vestoj | | 10.000,00 |
| ("Merenda Escolar" | | 10.000,00 |
| Manutenção carro e trator-Prizorgado veturilo kaj trajt | | 10.840,00 |
| Materiais e equipamentos-Materialoj kaj ekipaĵoj | | 65.003,00 |
| Rouparias (despesas postais, recebimento pacotes) | | 19.836,00 |
| Vestoj (Poŝtaj elspezoj, ricebado pakaĵoj) | | |
| Material Escolar - Lerneja materialo | | 9.221,00 |

| | |
|---|---|
| Mão de obra - Salajroj | 52.780,00 |
| Selos - Afranko | 4.416,00 |
| Documentos e despesas escritório-Dokum-kaj sekr.elspezoj | 7.863,00 |
| Diversos (Gás, medicamentos)-Diversaj (Gaso,medikamentoj) | 7.987,00 |
| | 474.627,00 |
| Caixa em 31/12/80 .... En la kaso je la 31/12/80 | 2.700,00 |
| Total - Entute | 477.327,00 |

## MONO POR LA BULTENO

Ricevita de:

| | |
|---|---|
| Maria Encarnação Moreno Cr$ | 500,00 |
| Claudio Zimmermann | 200,00 |
| Gilca Kluwe Damini | 49,00 |
| José Martins Coelho | 500,00 |
| Walter Francini | 200,00 |
| Fernando Aguilera | 200,00 |
| F.S.Almada (libroj venditaj) | 3.000,00 |
| F.S.Almada | 17.200,00 |

## GAZETOJ RICEVITAJ

"O Lider", Diário de Taubaté, Tambaú, Correio Popular, Tagiĝo, Suda Stelo, O Espirita, Fluminense, Sei, Diário do Povo, Kvakero Esperantista, Sekso kaj Egaleco, AGIG, Integração, Metrô-News, Brazila Katolika Bulteno, Inform. Cerqueira.

## SELOS USADOS VALEM DINHEIRO

Notadamente os comemorativos. Esperantistas, assim como organizações esperantistas devem usar tais selos em sua correspondência e remessas, pois que eles constituem fonte de renda, favorável às nossas organizações. Quanto mais usarmos, tanto mais proveitos darão. Colabore com a Sociedade Baruerense de Esperanto, enviando-lhe selos comemorativos usados. Endereço: - Caixa Postal n.63, CEP 17.100 - Bauru (SP). Nota. - O selo não deve ser tocado, isto é, deve estar em perfeito estado, embora, é natural, carimbado pelo correio.

## ILHEUS (BA)

Je peto de nia samideano, s-ro Eleus Leonardo de Sá, estis dekretita, laŭ Leĝo Nº 03/81, la nomumo de iu strato "Esperanto"en tiu urbo. Ankoraŭ iu sukceso de s-ano Eleus, kiu ĉion faras por ke la movado kresku en nia lando. Gratulon!

## INTERESO PRI ESPERANTO

La 66-a UK sendube alportis al ni eblecon plibone propagandi pri la internacia lingvo. Ĝi elmontras, klare, ke la lingvo estas viva kaj la adeptoj estas nultnombraj. La esperantistoj havas argumenton nun, ĉar eblas praktike konvinki la nekredemulojn kaj hezitantoj.

En sennombraj lernejoj tra la tuta lando oni faras propagandon pri Esperanto. La gazetoj volonte aperigas nuntempe artikolojn pri la movado kaj multaj komencantoj fortostreĉe lernas por partopreni tiun fenomenan UK-on.

Prof-rino Elvira Fontes, el diversaj fakultatoj de San-Paŭlo, ricevis inviton paroli pri Esperanto.

En la urbo Mogi das Cruzes la intereso ankaŭ kreskas en diversaj kernojoj. En Santos, en la spiritismaj medioj estas granda la intereso pri la movado lastatempe.

Bonaj lernolibroj estis eldonitaj kaj klarigoj pri Esperanto: Esperanto Elementar, de Prof-ro F. S. Almada, D-ro Esperanto Kaj Esperanto sen Antaŭjuĝo, de professoro Walter Francini, Lernolibro de s-ano Alan Kardek, kunmetitaj Verboj kun sufikso "UM", de prof-ro Euclides Carneiro da Silva, diversaj diskoj, inter kiuj elstariĝas tiu de prof-ro Sylla Chaves - "Aŭdu kaj Lernu", perradia kurso, Esperanto Lingua Viva", de prof-ro Paulo Amorim Cardoso, kaj aliaj bonegaj propagandiloj pri la movado.

## SPIRITA ELDONEJO - SOCIETO F. V. LORENZ

Tiu organizaĵo estis fondita antaŭ Kelkaj jaroj kaj ĝis nun eldonis kaj intersanĝis grandan kvanton da bonegaj verkoj. La kunordiganto kaj direktoro

de la Societo estas s-ano Delio Pereira de Souza. La eldonejo estas en Rio de Janeiro (RJ) - Caixa Postal Nº 3133, CEP 20.000.

En la suda parto de nia lando lastatempe senteble vigliĝas la movado. En la urbo Curitiba (PR), tri gejunuloj instruas Esperanton al siaj studentkolegoj.

En la urbo Porto Alegre (RS), kie okazis la Sudesperanta Renkontiĝo, en la pasinta septembro, mirinde progresas la movado. La radistacioj TV-Kanaloj serioze pritraktis Esperanton kaj la nombro de la kursanoj kreskis dank'al grupo de diligentaj esperantistoj.

En la urboj Pelotas kaj Rio Grande (RS) estas ankaŭ diligentaj esperantistoj, kiuj klopodas interesigi la fakultatojn pri la lingvo de l' futuro, Esperanto.

## BAURU (SP)
## ESPERANTO - LEĜO - LERNEJO

Euclydes Geraldis Carvalho

Ni celas analizi la leĝajn postulojn, kiuj povos faciligi la enkondukon de Esperanto en niajn lernejojn.

Ke ni vidu, resume, la Rezolucion nº 8 de la 1/12/71, de la Federacia Konsilantaro pri Edukado, kiu disciplinas la organizadon de la lernejaj kursoj de 1-a kaj 2-a gradoj de Brazilo, t.e., la tuto de la lernobjektoj, disciplinoj, aktivecoj kaj aferoj de tiuj lernejoj.

Asertas la Rezolucio:

"Artº 1-a - La komuna kerno devige enkalkulita en la plenaj kursoj de instruado de la 1-a kaj 2-a gradoj enhavos la jenajn lernobkejtojn:

a) Komunikado kaj Esprimo;

b) Sociaj Studoj;

c) Sciencoj.

§ 1-a - Por efiki la devigitecon atribuatan al komuna kerno, oni aldonas kiel specifikajn enhavaĵojn de la fiksitaj lernobjektoj:

a) en Komunikado kaj Esprimo - la Portugalan Lingvon;

b) En Sociaj Studoj - la Geografion, la Historion kaj la Socian Organizadon kaj Brazilan Politikon;

c) en la Sciencoj - la Matematikon kaj Fizikajn kaj Biologiajn Sciencojn.

§ 2-a - Oni ankaŭ postulas Fizikan Edukadon, Moralan kaj Civilan Edukadon, Programojn pri Sano kaj Religian Instruadon, tiu ĉi devige por la oficialaj lernejoj kaj libervolaj por la lernantoj".

Iomete poste oni vidas elstaran punkton kun granda graveco por la enkonduko de Esperanto en la 1-an kaj 2-an gradojn.

Temas pri punkto kiam la Rezolucio pritraktas la enkondukon de Fremdaj kaj Modernaj Lingvoj en la kursojn: Jen Kion ĝi asertas:

"Artº 7 - Oni rekomendas, ke ka komunikado kaj Esprimo, kiel aldonaĵo estu iu Fremda Lingvo Moderna kiam la lernejo estas preparata por ĝin enkonduki efike".

Atentu, do, ke, Fremda Lingvo Moderna ne estas sur la alineo "a" de la §-1a- de la Artolo 1-a, jam menciita en la Rezolucio, sed rekomendita kiel aldonaĵo en la supra artikolo. Sed ĝi tamen ricevas la karakteron de deviga lernobjekto, ĉar enkondukita en komunikado kaj Esprimo, kio estas deviga.

Kaj des pli tio ĉi estas vero, ke ĝi estas instruata en ĉiuj lernejoj de Brazilo. En tiu punkto, kune kun tiu Art. 7-a kaj ene de tiu sama Art. 7-a estas kien, ni opinias, oni povus enmeti Esperanton. Tiel ĝi venos praktike partopreni integre de la kurso de la lernejoj de 1-a kaj 2-a gradoj de Brazilo.

Tiu, kiu interesiĝos pri la leĝaj decidoj ĝis hodiaŭ adoptitaj vidos, ke Esperanto estas indikata apenaŭ kiel eduka praktiko aŭ libervola lernobjekto en la lernejaj kursoj.

Sed hodiaŭ la brazila Esperanto-movado povus peti al Ministerio por Edukado la enkondukon de Esperanto en la kursojn de la 1-a gradaj lernejoj de Brazilo kun egaleco al la fremdaj lingvoj modernaj.

La peto pri enkonduko de Esperanto en la Kursojn de la 1-a kaj 2-a gradoj, laŭ nia vidpunkto, devas fariĝi pli malpli laŭ

la jena maniero:

" . . . Ke, por la efikoj de la Rezolucio nº 8, de la 1-a de decembro 1971, oni enkalkulu la Internacian Lingvon Esperanto".

Kaj estante plenumita nia peto, kio sendube okazos, tio estos certe pere de Rezolucio. Kaj Rezolucio havas leĝoforton.

Tiel la lernejoj de 1a- kaj 2-a gradoj havos siajn pordojn malfermitaj al Esperanto. Kaj ni povos esperi ankaŭ, ke estante Esperanto liberigita por tiuj lernejoj, ĝi ankaŭ havos kompreneble ilin malfermitaj por la enir ekzamenoj ĉe Fakultatoj.

## AŬKCIO POR FONDAĴO CANUTO

Por plifaciligi la disvantigadon de Esperanto UEA kreis diversajn fondaĵojn, inter kiuj la Fondaĵon Canuto. Por akiri monon por tiu institucio UEA intencas okazigi aŭkion dum la 66-a UK.

Ni petas ĉiujn esperantistojn, kiuj havas iun aĵon kaj deziras donaci al UEA por aŭkcii ĝin, volu kontakti s-ron Milojević en la Libroservo de la 66-a UK. La pasintan jaron oni aŭkciis kongreslibron de la I-a UK, okazinta en 1905. Arĝentaj manĝilaroj, gem-ŝtonoj, kaj aliaj interesaj raraĵoj, estos bonvenaj.

## LIBROSERVO

Laú vi scias, estas Brazila Esperantista Junulara Organizo - BEJO - kiu zorgas pri la Libroservo okaze de la 66a UK en Brazilia.

Ĉu vi sendos, ĉu alportos librojn por ke ni disvendu, bonvolu plej baldaŭ sendi al ni (BEJO-adreso) la fakturon de ĉiuj libroj krom liston de la titoloj en alfabeta ordo ĉar ni tuj eldonos specialajn propagandajn flugfoliojn. Cetere por bone organizi la Libroservon nepre ni atendas tiujn informojn de Vi.

Profitante la okazon, ni antaŭdankas iujn helpojn kiujn Vi povus oferi al ni por deĵori en la LS, laŭ sugesto de S-ro Simo Milojević (cirkulero de 15 Majo 81), sed BEJO jam sin organizis detale por tiu laboro kaj havas la koncernajn helpdjorantojn kontraktitajn. Tial ni preferas ke nur tiuj personoj respondecu por tiu tasko, por pli bone gliti gi la laboron, kompreneble.

Ni antaŭdankas pro via bonvolo kaj komprenemo.

## RADI-AMATOROJ

La radiamatoroj tra la tuta lando disvastigas la lingvon kaj kontaktiĝas kun granda parto de la mondo. Dank'al la radiamatorismo la L.K.K. facile havas kontakton kun Eŭropo kaj tio multe faciligas la laboron de la komisiono de la 66-a Universala Kongreso.

## NATAL (RN)

"Pasintjare la Potigvara Esperanto-Asocio fariĝis 40-jaraĝa. Kun escepto de sia unua jarkvino da funkciado ĝi neniam travivis periodon tiel fruktodonan kaj sukcesplenan kiel nuntempe" - skribis al ni prof-ro Ivaldo A. de Souza, el tiu urbo.

En la Federacia Universitato funkcias Progresigaj Esperanto-Kursoj. Estas preparataj diplomotaj instruistoj, kiuj lernas en pluraj kursoj. La propagando estas granda, la Asocio havas propan sidejon en kiu funkcias pli ol dek diversaj kursoj kaj la gelernantoj sin preparas por la 66-a UK.

Gratulon! Ni deziras plenan sukceson kaj ĝojas renkontiĝi kun novbakitaj esperantistoj el Rio Grande do Norte.

## BELO HORIZONTE (MG)

Antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj estis fondita en tiu urbo la Instituto-Esperanto de Klarigo, kies direktoro estas s-ro Onésimo Farias. Li tuj post la ekapero de la organizaĵo, sukcesis aĉeti plurajn salonojn por la instruado de Esperanto. Ĝi situas en la strato Guajajaras, 410-S/810-"Edifício Rotary" - CEP 30.000 - Belo Horizonte, kie li atendas vizitantojn el la tuta lando ĉiusabate kaj jaŭde de la 19-a ĝis la 21-a horo.



Sur la foto estas sam-ino MARIA ALMADA, esperantista pentristino, antaŭ sia pentraĵo "Floroj de l'Printempo". S-ino Almada estas membro de la Societo de la Marbordaj Pentro-Artistoj, el Santos (SP). Ŝi partoprenis jam diversajn ekspoziciojn en Santos kaj São Paulo. Oni povos vidi sian ekspozicion dum la 66-a UK. S-ino Almada la unuan fojon montros siajn artaĵojn al la esperantista publiko, kio favoros la esperanto-movadon.

En la jaro 1978-a estis fondita la Universala Artista Ligo de la Esperantistoj UALE en Tikkakoski, Finnlando, kies aliĝo al UEA, kiel unu el ĝiaj fakorganizaĵoj,, estos traktota dum la 66-a UK en Brazilia. La reprezentanto de UALE estas sam-ino Maria Almada, kiel ĝia vicprezidantino.

La unua, elektita multnacia estraro de UALE estas la jena:

Prezidanto: S-ro Aulo Kustas Minell, Finnlando.

Vicprezidantino: Maria Almada, Brazilo kaj s-ro Gisli Jonsson, Islando - Vicanoj: S-ino Humiko Kavahito, Japanujo kaj s-ro Peter Charles Christopher, el Anglujo.

Revizoroj: S-ino Rotta Hirvi, s-ro Eino Lehkonne, s-ino Seija Kettunen kaj s-ro John Edv. Leppakoski, ĉiuj el Finnlando.

Aperis interesatoj pri la UALE el jenaj landoj: Nederlando, Germanio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Rusujo, Brazilo, Finnlando kaj Bulgario.

La direktoro de la fakaj-agadoj ĉe UEA estas s-ro Petro Todorov el Bulgario. Interesatoj de UALE volu partopreni la ekspozicion kaj ka kunvenon, kies horo kaj loko estos anoncotaj ĉe la informtabulo de la 66-a UK en Brazilio.

## KOMISIONO PRI VIRINA AGADO

La 1975-a jaro estis dediĉita al la mondvirinaro kaj tiukaze estis kreita la komisiono pri Virina Agado, kiun gvidas elstaraj samideaninoj. La nuna direktorino estas f-ino Anna Brennan, el Nederlando, kiu badaŭrinde ne povas partopreni la 66-an UK-on, sed venos s-ino Eliza Kehlet kaj eble f-ino Loes.

Okazos oficialaj kunvenoj kaj ne formalaj ankaŭ, dum kiuj oni povas praktikadi la internacian lingvon libere.

Grupo da esperantistinoj zorpos pri la laboroj kaj amuzaĵoj. Ni petas ĉiujn s-inojn aperi amase kaj riĉigi la kunvenojn.

La brazilaj esperantistinoj bonvenigas la eksterlandaninojn en Brazilo!

*Centro de Cópias Cerqueira Compôs e Imprimiu*